Bulteno de la **Londona Esperanto-Klubo** 2018 julio-aŭgusto

## Kluba Programo:

**julio:**

6 Prilingva vespero (IBIS Shoreditch)

13 John Wells: *Lingva Seminario* (Dioramo) (1800h Konsilantaro)

20 Literatura diskuto (IBIS Shoreditch)

27 Diccon Masterman: *59-jara esperantista vivo: de JEB al la estraro de UEA*

**aŭgusto:**

3 Prilingva vespero (IBIS Shoreditch)

10 Terry Page: *Matematikistinoj: ĉu mitaj aŭ nur tre maloftaj?* (Dioramo) (1800h Konsilantaro)

17 Diskuto (gvidos André Staes) *La kolorteorio de William Ewart Gladstone (1809-1898)* (IBIS Shoreditch)

24 Christopher Lewis: *La historio de Kimrujo* (Dioramo)

31 Prilingva vespero (IBIS Shoreditch)

**septembro:**

7 Literatura Vespero

---

## Klubano estas maldungita post partopreno en manifestacio

LEK-ano **STANO KEABLE** informas nin ke li estis sendungita far la magistrato* de Hammersmith & Fulham, kie li perlaboris dum 17 jaroj pri hejmaj vivkondiĉoj, pro tio, kion li diris en konversacio dum publika manifestacio, filmita sen lia permeso.

Stano apelacias por renversi la decidon, kaj petas financan subtenon de la publiko por eblaj juraj kaj kampanjaj kostoj, ĉe www.gofundme.com/ReinstateStanKeable, kie ankaŭ troviĝas detaloj de la akuzoj.

* magistrato(Z) = gvidantaro de urbo aŭ municipo (t.e. *Borough Council*)



**Diccon Masterman (vidu julio 27)**

Diccon Masterman estas dumviva membro de UEA. Li estas en siaj 70-aj jaroj, emeritiĝis post plur-jara estrado de propra firmao kiel internacia agentejo pri la vendado kaj prizorgado de feridomoj. Pli frue li dum kvar jaroj laboris kiel konstanta kongresa sekretario de UEA. Antaŭ tio li havis 16-jaran karieron kiel piloto kaj oficiro en la brita aerarmeo (demisiis kiel majoro). Li ankaŭ dum unu jaro laboris en Londono kiel administra dungito de la firmao Michelin, kaj, dum du jaroj inter lernejo kaj universitato, kiel instruisto en Britio kaj Francio. Li loĝis en ses landoj kaj laboris per kvar lingvoj. Li esperantistiĝis 19-jara kaj estis sekretario de Junularo Esperantista Brita dum unu jaro.

Renato Corsetti

### KER-ekzamenoj en Diorama la 16-an de junio

Jam la trian jaron ripetiĝas la ekzameno laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro/KER en Londono en la kadro de la monda ekzamentago kun surlokaj skribotaskoj kaj voĉa ekzamenado de malproksime per *Skype*.
Ĉi-jare la kuraĝaj ekzamenatoj estis Marcus Richardson kaj Christos Bohoris el la Esperanto-Grupo de Southampton, Maurizio Giacometto el Reading, Andreo Marshall el Grimsby kaj Chris Lewis el la Londona Esperanto-Grupo.
Surlokaj organizantoj kaj mastrumantoj de la ekzameno estis Renato Corsetti, Marteno Miniĥ kaj Lenio Marobin.
Dankon al EAB, kiu finance subtenas la ekzamenantojn per repago de parto de la kotizo!

Jam pli ol 20 britoj trapasis en Londono ĉi tiun oficialan ekzamenon de la universitato de Budapeŝto en la lastaj tri jaroj.

La urbestro de Londono, Sadiq Khan, sendis bondezirojn al la kandidatoj.

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Ibis London City – Shoreditch Hotel, 5 Commercial St,
London E1 6BF (por diskutvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:
18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria", "Northern"), Euston Square ( "Hammersmith & City", "Circle"), Regents Park ("Bakerloo").
Fervojo *London Overground*: Euston
Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390, 453, C2.
Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East – uzu la eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith & City", "District"); Aldgate (linioj "Circle" "Metropolitan").
Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo: http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.
Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

## Mesaĝo de la Konsilantaro

Pro neatendita okupiĝo, la Prezidanto ne povas fari sian kutiman leteron por ĉi-tiu bulteno.

En la lasta periodo, ni ĝuis, danke al nia nova Honora Prezidanto **JOHN WELLS**, ne nur du lingvajn seminariojn (kiujn li gvidis), sed ankaŭ gastprelegon, dum kio li rakontis pri diversaj eventoj en la propra vivo.

**ERIC LEE** prezentis sian libron pri eksperimento en Kartvelujo, kie oni kreis egalecan ŝtaton post la unua mondmilito. Kartvelujo ne estas granda ŝtato, sed pri la eksperimenta socialdemokrata ŝtato interesiĝis ĉiuj socialistoj en Eŭropo, inkluzive de gvidantoj de la laborista partio de Britujo, kiuj vizitis la landon. Ĉio finiĝis post tri jaroj sekve de invado fare de la ruĝa armeo.

Ĉe IBIS, hazarda vizito de **LIVEN DEK**, kreis viglan variaĵon en la tiea programo. Li rakontis pri pluraj literaturaj temoj kaj ĉefe pri sia lastatempa pasio, la mikro-noveloj.

Ni gratulas la sukcesintojn en la ĵus okazintaj KER ekzamenoj.


*La Konsilantaro*


***Kursoj de Esperanto konsilindaj al viaj neesperantistaj konatoj:***

*Senpagaj retaj kursoj ĉe https://lernu.net/en , https://en.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online kaj https://learn.esperanto.com/en/*

*Senpagaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj rekomenciĝos komence de septembro en norda Londono (apud stacidomo de Highbury and Islington). Petu informojn ĉe anna.lowenstein@esperanto.org .*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 19a aŭgusto por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*




Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.
Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Chris Lewis, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.